

Ludvig Bødtcher,  
Fredensborg

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Se nebuliĝas la racio  
kaj superŝaŭmas en mi ĉio,  
ho, Fredensborg', min tiru vi  
en vian pacon, ke mildiĝu  
kaj enarbare rekalmiĝu  
la ŝtormo de l' junec' en mi!

Se ronĝas min ĉagren-doloro  
mortige, mute en la koro,  
mi ree fuĝas serĉi vin,  
iradi tra la verdaj haloj,  
ĝis viaj ravaj najtingaloj  
per sia kant' plorigis min.<sup>3</sup>

Nur vi en miaj pensoj ĉiam  
vivadu, ĝis elbatos iam  
la kor' en mi, sen ĝoj' kaj zorg'!  
Ĝis mutos birdoj sur la kverko  
kaj iĝos el la ligno ĉerko  
kaj tombo – mia Fredensborg'!<sup>4</sup>

*Traduko de la Dana poemo "Fredensborg" de LUDVIG BØDTCHER (\*1793-04-22 – †1874-10-01) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-09.*

MR-156-2 / Arg-238-477 (2004-05-17 16:13:58)

---

<sup>3</sup>aŭ eble: plorsolve resanigis min.

<sup>4</sup>La dana vorto „Fredensborg“ signifas „pac-kastel“-on. Ĝi estas reĝa kastelo kaj parko situanta sur la insulo Zelando ne malproksime de la dana ĉefurbo Kopenhago.